

ĈEA-retkomunikoj 5/2004

CxEA-retkomunikoj estas neregula informilo de Cxehxa Esperanto-Asocio por siaj membroj kaj por la ceteraj esperantistoj, kiuj mem montris intereson aux estis de iu rekomenditaj kiel interesatoj. Se vi ne deziras plu ricevadi ilin, sufcixas skribi "ne sendu" al la retadreso chrdle@kava-pech.cz kaj vi estos tuj forvisxita de la dissendolisto.

ENHAVO:

1. UK 2005 en Vilno
2. Nove anoncitaj arangxoj en Cxehxio kaj najbareco
3. Niaj veteranoj
4. Novajxo el la eldonejo KAVA-PECH
5. Kristnaskaj kaj Novjaraj bondeziroj

1. UK 2005 EN VILNO

La 90-a Universala Kongreso de Esperanto okazos en Vilno (Litovio) inter la 23-a kaj 30-a de julio 2005. Auxtobusan karavanon al la kongreso organizos Asocio de handikapitaj esperantistoj (josef-hron@volny.cz).

Ni atentigas interesatojn, ke la limdato por aligxi al la kongreso pagante la plej malaltan kotizon estas fine de jaro. Cxar necesas iom da tempo por ordigi la aligxilojn kaj anonci al UEA, la pagoj kaj aligxiloj devas atingi la konton de la kongresa peranto KAVA-PECH plej malfrue la 29-an de decembro 2004.

Cxiujn bezonatajn indikojn por aligxi vi trovos sur <http://www.esperanto.cz>. Do, ne hezitu, rigardu kaj aligxu al la plej grava cxiutaga Esperanto-arangxo!

2. NOVE ANONCITAJ E-ARANxOJ EN 2005:

2005-01-07/09: Liptovský Ján: 23-a Ascendo sur montopinton Poludnica (Malaltaj Tatroj) kaj renkontigxo de vojaĝxantoj. Inf.: janvajs@pobox.sk, vajs@sppk.sk

2005-04-11/17, Skokovy: la 20-a lingva seminario de AEH. Inf.: aeh-ikeh@volny.cz

2005-05-?? (precizigota), Svitavy: Porinfana Esperanto-tago. Inf.: dvorakovalibuse@quick.cz

2005-06-19, Czantoria: cxehxa-pola-slovaka renkontigxo sur la pinto de landlima monto Czantoria. Inf.: suchanekj@atlas.cz

2005-07-16/23, Piliscaba: la 17-a Ekumena Kongreso (58-a de IKUE kaj 55-a de KELI kune kun la 7-a Junulara Ekumena Esperanto

Tendaro). Inf.: cea-polnický@quick.cz

2005-09-?? (precizigotaj tempo kaj loko): IBIRE 2005
(Internacia Biciklista Renkontigxo). inf.: chrdle@kava-pech.cz

2005-10-03/09, Dobřichovice apud Prago: InPaSem (Internacia Paroliga Semajno. Inf.: chrdle@kava-pech.cz

2005-10-21/23, Vyškov: Kongreso de Cxehxa Esperanto-Asocio.
Inf.: cea-polnický@quick.cz

La kompletigatan liston de Esperanto-arangxoj en Cxehxio kaj najbaraj landoj vi povas trovi iam ajn cxe <http://www.kava-pech.cz>

3. NIAJ VETERANOJ:

La 13-an de decembro gxisvivis sian 93-jarigxon samideano Bohuslav Kumpošt el Hradec Králové. Malgraux sia agxo li restas aktiva esperantisto kaj legadas Esperanto-librojn kaj aliajn E-materialojn. Sinceran gratulon!

Tiuokaze ni volas nomi pliajn niajn meritplenajn Esperanto-veteranojn, kiuj jam transiris la agxon de 90 jaroj: honora membro de CxEA el Japanio Kurisu Kei, Marie Cejnarová, Praha, Václav Šavel, Praha, JUDr. Karel TRaxler, Příbram, JUDr. Václav Rajlich, Tábor, Antonín Střelba, Česká Lípa, Vladimír Rychlík, Žacléř, Karel Blažek, Mnichovo Hradiště a Františka Šťábová, Velké Losiny. Al cxuij cxi ni kore deziras sanon kaj gxojon de Esperanto ankoraux dum pluraj jaroj.

4. Novajxo el la eldonejo KAVA-PECH:

Jxus aperis La Aventuroj de la Brava Soldato Švejk dum Mondmilito de Jaroslav Hašek kun ilustrajxo de Josef Lada. Temas jam pri la 40-a eldonajxo en Esperanto aux iel ligita al Esperanto (lerniloj, vortaroj, tradukoj el Esperanto cxehxen) de entute 87 libroj de la eldonejo.

Pliajn informojn pri gxi kaj ankaux pri la ceteraj eldonajxoj troveblas sur <http://www.kava-pech.cz>. Cxar la prezoj de E-eldonajxo estas altaj (pro la malgrandaj eldonkvantoj), la membroj de CxEA, AEH, SKEF kaj SKEJ rajtas acxeti (laux la kontrakto inter ili kaj KAVA-PECH) po unu ekzemplero por propra uzo kontraux rabatitaj prezoj. Ankaux tiun avantaĝxon vi povas trovi sur la sama pagxo.

5. Kristnaskaj kaj Novjaraj Bondeziroj:

Cxar alproksimigxas la festotagoj, ni deziras al vi, legantoj de la CxEA-retkomunikoj, agrablajn kaj gajajn Kristnaskajn Festotagojn kaj bonan elpasxon en la jaron 2005.

Nome de la redaktokonsilio, Petro Chrdle

Por via informo jen la konsisto de la redaktokonsilio: V. Podhradská,
J. Melichárková, L. Karešová, L. Dvořáková, J. Hron, P. Polnický, M.
Malovec, J. Tomeček, Z. Pluhař kaj P. Chrdle